

1 ☆ 1995 ☆ 163

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

LA 31-AN DE MAJO 1914 ESTIS ĈI TIE
INAŬGURITA KAJ EN 1938 DETRUITA
LA UNUA MONUMENTO HONORE AL

D-ro L.L. ZAMENHOF
AŬTORO DE
ESPERANTO
LA INTERNACIA LINGVO



LA MEMORTABULO INAŬGURITA DUM
LA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ-
HANDIKAPULOJ 19X 1991 DETRUITA 10.VI.1994 RENOVIGITA
KUN HELPO DE BRITAJ ESPERANTISTOJ, DE ĈEĤA
ESPERANTO-ASOCIO KAJ DE RAYMOND BORE APRILE 1995



RENOVIGITA MEMORTABULO EN FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
- PRI LA ZAMENHOFA MONUMENTO LEGU SUR LA PAĜO 3

50-JARA DATREVENO

Antaŭ duonjarcento finiĝis la plej granda kaj terura milito en la homa historio, kiu ricevis la epiteton Dua Monda. Ĝi estas ankaŭ datreveno de la unuaj du kaj espereble la lastaj du **atombomboj** jetitaj sur vivantajn homojn, konkrete sur la japanajn urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki. Ĝi estas datreveno de **amasa buĉado** de „malplivaloraj rasoj“, precipe judoj kaj ciganoj, sed ankaŭ slavoj kaj aliaj.

Estas bedaŭrinde, ke ankoraŭ nun post kvindek jaroj la malamo ne malaperis el la mondo, ke malamoj religia, naciisma kaj rasisma floras kaj buĉas la homojn en multaj lokoj de nia planedo.

Nia lando restas relativa oazo de trankvilo, sed ankaŭ en ĝi mallaŭte ĝermas **rasismo**, precipe kontraŭ ciganoj (romaoj). Faŝistoj en Osviecim likvidis pli ol 22 000 ciganojn, inter ili 5 400 el Bohemio kaj Moravio. Kiel interstacio por Osviecim servis koncentrejoj en vilaĝoj Hodonín apud Blansko kaj en Lety apud Písek (tie en majo 1995 prezidento Václav Havel inaŭguro monumenton al la romaaj viktimoj).

Ciganoj venis en nian landon en la 14-a kaj 15-a jarcentoj. Ekde la komenco ekzistis reciprokaj malsimpatioj inter romaoj kaj „gaĝoj“, pro diferencaj haŭtkoloroj kaj lingvoj, pro la sukcesa rezisto de la minoritato lasi sin englutiti de la majoritato, pro la diferencaj kulturoj kaj moraloj. Ĉefe la lasta punkto estas ofte uzata kiel kontraŭcigana argumento, nome ke ili estas nacio de ŝtelistoj kaj trompistoj. Tamen la policaj statistikoj pruvas, ke nur 3% de romaoj estas krimuloj. Sed ni ĉiun delikton de kelkaj unuopaj ciganoj subkonscie opinias krimo de la tuta ciganaro, dum plej grandajn

krimojn de blankuloj (ekz. gigantajn trompojn kun nafto kaj rumo) ni neniam konsideras krimo de la blanka raso, ni neniel sentas nin respondecaj pri la misfaroj de niaj samrasanoj.

Sed sufiĉas unu cigana krimo kaj jam ĉiujn ciganojn ni volus peli al respondeco. Ĝuste la fakto, ke anstataŭ konkretaj kulpintoj estas persekutata ilia raso, helpas la misfarintojn eskapi antaŭ la justeco.

Ni kondolencas

8. 2. 1995 forpasis s-anino Růžena Nekvasilová, tre oferema, aktiva kaj longjara funkciulo de E-klubo en Znojmo. Ŝi estis 77-jara.

V.Rotrekl

La 18-an de februaro 1995 mortis pentristino kaj esperantistino Věra Bouchnerová-Staňková en sia neĝisvivitita 80-a jaro

Komercaj reklamoj en Starto:

1 linio en kolumno 25 Kč
 kvaronpaĝo ... 800 Kč
 duonpaĝo ... 1500 Kč
 tuta paĝo ... 2500 Kč

Ripetita anonco ĉe samtempa mendo en du numeroj ricevos rabaton 15%, en tri aŭ pluraj numeroj 30%



VORTOJ AL LA LEGANTOJ

Ing. Vlastimil Kočvara

Legante tiun ĉi alparolon vi jam travivis kelkajn monatojn de la jaro 1995. Sekve do estus superflua ia ajn novjara mesaĝo. Tamen mi uzas rajton alparoli niajn membrojn kaj legantojn sur la unua paĝo de nia asocia organo. Mi ne volas trumpe- ti niajn pasintjarajn sukcesojn, nek pri- plori niajn malvenkojn. Kiu orientiĝas en la enlanda kaj ankaŭ monda movado, ne bezonas multajn klarigojn: nia asocio plenumis la promesitaĵojn, kvankam ĝi malestabis la oficejon kaj eklaboris sen dungitoj. Ĝi kontribuis al la esperanta libromarkato, el Seŭlo alportis Universalan Kongreson por Prago. La asocia organo, kiun vi tenas en la manoj, modernigis sian vizaĝon kaj atingis solidan teknikan nivelon. Nur la eldon- periodo iom lamas, sed ĝin reguligi estas programo por tiu ĉi jaro. Nu, koncize mi diru: La asocio vivas kaj agas malgraŭ multaj gravaj kaj komplikaj obstakloj kontraŭstarantaj nian komunan noblan „hobion“.

Kio do estas la ĉefa kialo de daŭra kaj seninterrompa agado de nia verda komun- umo en Ĉeĥa respubliko? Mi ne hezitas respondi: la ĉefa kaj ununura kialo estas vi, membroj de ĈEA de ĉiuj kategorioj, klubanoj kaj rektaj membroj el la tuta lando, vi, kiuj kredas al nia ideo. Vi elektis nin, komitatojn, por direkti la organizaĵon kaj vi fidis al ni, ke ni direktas ĝin por via prospero. Via fido kaj fideleco, kiu interalie esprimiĝas en mal- avaraj mon-donacoj, en multaj alvenantaj leteroj al ni - kaj ni akceptas ankaŭ kriti- kajn - en intereso pri niaj eldonaĵoj, estas fonto, el kiu ni ĉerpas emon kaj energion por nia laboro servanta al vi. Tial mi ĉe-

starto de plua jarkolekto de Starto volas esprimi profundan kaj koran dankon al ĉiuj niaj membroj, ĉar nur danke al ili havas nia laboro kaj strebado plenan sencon.

PRI LA ZAMENHOFA MONUMENTO EN FRANTIŠKOVY LÁZNĚ

La partoprenintoj de la 5-a kongreso de ĈEA, okazinta septembre 1988 en Olo- mouc, tenas certe en sia memoro mo- menton, kiam en diskuto estis eldirita la ideo, ke la ĉeĥa esperantistaro sentu sian moralan devon renovigi la Zamenhofan monumenton en Františkovy Lázně. Ĝia sorto - ĝi ja estis detruita fare de nazioj en 1938 - kaj ĝia origino - la inaŭguro estis rezulto de monkolekto, kiujn ambaŭ instigis kaj reĝisoris loka Esperanto- klubestro J. Hechtl en 1914, meritis ne forgesi la agon, kiu tiutempe apartenis al la pioniraj en Esperantio.

La olomouca kongresanaro subtenis la iniciaton per aplaŭdo kaj tuj devontigis la novelektitan asocian estraron al realigo. Oni jam antaŭvidis la inaŭguron enpro- gramitan en la planita UK en Prago en 1991 aŭ 1992 (kiu fine ne realiĝis). La estraro senprokraste serioze pritraktis la aferon kun lokaj oficialuloj en Frant. Lázně kaj invitis eminentan skulptiston kaj asocianon Josef Harcuba krei konven- nan projekton. Samtempe komenciĝis monkolektado, ĉar kutima buĝeto de ĈEA ne permesis tiom luksan elspezon, kiom la renovigo de la monumento postulus. Por malavarigi esperantistojn aperis varb- prospekto en la ĉeĥa kaj en Esperanto, la proponinto de la nova monumento faris ankaŭ belan diplomon por ĉiuj kontri- buontoj al la monumenta fonduso. La aso- cio eldonis ankaŭ specialan medalon por la plej malavaraj donacantoj. Poste - ne

tro vige - alfluis monaj donacoj por la monumento ĉefe de ĉeĥaj esperantistoj. Sed, bedaŭrinde, pri nia intenco ni apenaŭ sukcesis ekinteresiĝi eksterlandajn esperantistojn, de kiuj ni atendis ĉefan alflulon de financoj. Tial la fina stato estis tute diferenca disde niaj esperoj. Intertempe dum lastaj jaroj grave altiĝis ĉiuj prezoj, kaj la sumo por rekonstrui la monumenton rapide atingis centmilojn, dum ni amasigis nur dekmilojn da kronoj. Tiun sumon plene elĉerpis presado de varbprospektoj kaj diplomoj, la stampado de medaloj, kiuj preskaŭ tutkvante deponiĝas en la asocio kaj modesta honorario por fari necesan modelon de la monumento.

En tiu momento mi devas klare diri, ke nia komuna kongresa entuziasmo en Olomouc trotaksis niajn eblojn kaj forton de la movado. Sed tamen, la preparita loko en Františkovy Lázně ne restis tute orfeca. En 1992 okazis en la banurbo la I-a mondkongreso de handikapitaj esperantistoj, kiun organizis la samnoma sekcio de ĈEA. Okaze de la kongreso estis inaŭgurita modesta ŝtona monumento kun memortabulo dediĉita al d-ro Zamenhof. La teksto vekis vere iom da kritiko, sed ĝi tamen alrememorigis la originan monumenton. ĈEA parte financis tiun ĉi memorŝtonon. Bedaŭrinde, ankaŭ ĝi ne havis feliĉan sorton. En la jaro 1994 ĝi fariĝis celo de vandaloj, kiuj la memortabulon disrompis.

La komitatoj de ĈEA kaj Asocio de handikapitaj esperantistoj (AEH) interkonsentiĝis denove instaligi la memortabulon kun nova teksto kaj formo. La elspezojn por ĝi kovros ambaŭ asocioj. En nuna tempo la tabulo estas prilaborata kaj somere oni denove - fakte jam la trian fojon - inaŭguros ĝin dum renkontiĝo organizota de AEH.

Nu, fine, la celo de miaj informoj: Montri al niaj membroj kaj al ceteraj esperantistoj, ke ni ne rezignas pri la novkonstruo de la monumento, sed ni forŝovas tiun celon en estontecon. Ĉefe tial, ĉar kolektitaj financoj estis plene elspezitaj por preparaj laboroj kaj ankaŭ por dufoja renovigo de ĝi en iom provizora aspekto. Sed la diplomoj kaj medaloj por mecenatoj restas. Eble ni iam estos tiel riĉaj, ke nova kaj impona monumento denove omamos ĉarman parton de la fama banurbo, kiu montris sian bonan rilaton al nia Majstro kaj ties verko jam antaŭ 80 jaroj.

Vlast. Kočvara

Movado en Slovakio

Post la malfondita Slovaka Esperanto-Asocio estiĝis novaj organizoj:

Esperanto-regiona Centro, Sobotské nám. 6, 058 01 Poprad kaj Esperanta Societo '95, Račianská 80, 831 02 Bratislava (ESO'95). Kiel anoncis bulteno **Raportanto 1/95**, eldonata de **Esperanto-klubo en Žilina**, nuntempe estas preparata statuto por nova organizo en la meza Slovakio.

La societo en Bratislava ligis kunlaboron kun Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj komune eldonas novan interkulturan revuon **LA DUA JARCENTO de Esperanto**, en kies mezo 4-paĝa suplemento „Esperantisto Slovaka“ daŭrigas la tradicion de la fama slovaka E-periodaĵo. La unua numero de la DJE 1/95 prezentas ambaŭ urbojn (Vieno kaj Bratislava), salutajn esprimojn en la germana kaj slovaka, facilajn anekdotojn pri Victor Hugo kaj Pablo Picasso kun komentario, intervjuon pri la nova societo kaj gazeto kaj ankaŭ rakonton „Samuel Birrubali

Rossiter" de la aŭstralia verkisto Trevor Steele.

La Esperanto-regiona Centro en Poprad ofertas en la venonta jaro diversajn kulturajn, turismajn kaj fakajn aranĝojn.

De la 11-a ĝis la 18-a de februaro okazis la 7-taga skisemajno, kun ebleco skii en Altaj Tatroj; de la 17-a ĝis la 19-a de marto - Votra Esperantista Renkontiĝo en Altaj Tatroj; Printempa Renkontiĝo en Altaj Tatroj (naturprotektado kaj flaŭro) - **de la 5-a ĝis la 7-a de majo** (20 + 4 \$); „Venu kaj aĉetu“ nomiĝas internacia seminario por komercistoj, en Poprad, de la 2-a ĝis la 4-a de junio (20 + 4 \$). Inf.: **Esperanto, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad, Slovakio, ☎ 0042-92-32419.**

La unua Forumo „**Etnoj kaj Naturo**“ - **ETNA '95**, reflektos la rilaton inter la eŭropaj etnoj kaj medio kaj okazos en Poprad de la 26-a de junio ĝis la 5-a de julio 1995. Agantoj de sciencoj kaj kulturo, ĉiuj, kiuj konscias pri la neceso konservi bonkvaliton kaj diversecon de la kultura kaj natura vivmedio de la homaro, estas invitataj (aranĝas fama rusa sciencisto kaj esperantisto d-ro Lev Medvedev, **Akademia Novego Myslenija, Pjatnicka 7, 113035 Moskvo, ☎ 7095-2330781.**)

Ni deziru al niaj slovakaj samideanoj multajn sukcesojn.

Informoj el la komitato de ĈEA

La januara kunveno de la komitato (21.1.) efektiviĝis en Prago en Palaco de kulturo. Jen, do, en la kongresejo de la 81-a UK. Krom komitatanoj ĉeestis ankaŭ la ĝenerala direktoro de UEA Simo Milojeviĉ. Tio kompreneble influis la programon de la sesio, ĉar oni parolis multe pri la UK-o en 1996. La diskutoj

rilatis nur al ĝeneralaj aferoj, ĉar la praktikajn devos solvi LKK de la kongreso, kiu ĝuste establiĝis laŭ propono de ĈEA-komitato, kiu la proponitojn metis al Rotterdamo por aprobo.

Plua grava punkto de la komitata traktado koncernis Starton. Post malestabligo de la asocia oficejo ĝi estas la plej grava ligilo interne de la asocio. La redakta rondo klopodas plenumi sian gravan rolon, ĝi faras tion bone, tamen en kelkaj aferoj ĝi bezonas subtenon de la komitato. Nun oni strebas akuratiĝi la eldonritmon. Al tio certe helpas la nova teknika ekipaĵo, kiun oni decidis ekhavigi al la asocio. Lige kun tio estis decidite fari novan membro-kartotekon, al kio la prezidanto petas kunlaboron de la membraro. Ĉiu membro ricevis koncernan leteron respondendan laŭeble poŝtrevne. Ne malpli grava estis debato pri mastrumado de la asocio, nome diskuto kaj aprobo de la ĉijara buĝeto. Post kelkaj aliaj (ne tiom gravaj) programpunktoj, kiel karavano al UK en Tampere, IKUE-kongreso en Olomouc, organizaj aferoj ktp., la komitatkunveno finiĝis en malfrua posttagmezo. Senprokraste post ĝi okazis la unua kunveno de LKK kun S. Milojeviĉ, kiu daŭris ĝis vespero.

La dua ĉijara komitatkunsido okazis 4. 3. en Pĕřerov danke al invito de L. Chytil. Samkiel en januaro oni pridiskutis la mastrumadon de la asocio, ĉifoje rezultojn de la jaro 1994. Ili estis aprobitaj, kvankam kelkaj spezoj bezonas ankoraŭ precizigon - tio ĉi rezultigis el inventuro de la asocia havaĵo farita post translokiĝo el Jilská strato. Detale estis diskutita stato de preparo de 48-a IKUE-kongreso en Olomouc - raportis Miloš Šváček, ĉefo de la organiza kolektivo. La specialan atenton ricevis agado de kluboj kaj la komi-

tatanoj informiĝis pri iliaj diversaj aktivadoj. La respondeculo por kluba agado P. Polnický preparos instrukciojn pri kelkaj laŭleĝaj devoj, tiuj estos dissenditaj al ĉiuj jure memstaraj kluboj en kadro de ĈEA. Fine de la kunveno oni interesiĝis pri vico da malpli gravaj, tamen ne neglekteblaj asociaj aferoj.

Vl. Kočvara

Karpata Esperanto-Ligo (KEL)

estas nova interregiona asocio, kiu volas kunlaborigi la karpata-regionajn landojn (Hungario, Ĉeĥio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio). La fondintaj reprezentantoj (krom la ĉeĥa) kunvenis la 2-an de oktobro 1994 en la ukraina Majdan. ĈEA estis aldone invitita eniri la ligon, sed nun ni estas okupitaj per preparo de UK '96. La ligo celas kunlaborigi la karpatajn E-asociojn kaj ankaŭ ŝtatajn kaj neŝtatajn organizojn en tiuj landoj. Kiel rimedoj povos servi konferencoj, simpozioj, festivaloj, komunaj entreprenoj pri kulturo, ekologio, skoltismo, folkloro. Interesatoj pri Bulteno de KEL skribu al **Juliusza Wasika, Horodek Pl 38-613, Wolkowyja, Pollando.**

PEDAGOGOJ DUM LA KONGRESO

Dum UK '96 en Prago kiel kutime ILEI organizos programon „Tago de la Lernejo“ (la temon decidos la ĉijara kongreso en Tampere), plie realiĝos internaciaj ekzamenoj kaj Cseh-seminario. Tuj post la kongreso estas planata Konferenco de ILEI (ĉ. 150 plenkreskuloj) kun Gimnazio (20 geknaboj 12-16jaraj). **Nia pedagogia sekcio devos prezenti sian laboron antaŭ la internacia publiko, do necesas reaktivigi ĝin.**

BET-31

En la litova urbo Girionys proksime de Kaunas okazos julie 1995 (8/16-7-1995) la 31-aj **Baltiaj Esperanto-Tagoj** kun celo studi problemojn kaj taskojn de E-movado, pliperfektigi la lingvoscion kaj enhavoriĉe pasigi la tempon. Kiu volas konatiĝi kun la baltia movado kaj subteni ĝin, aliĝu ĉe Litova Esperanto-Asocio, ab./k. 167, LT-3000 Kaunas, tel. 208503.

KOSMOS

estas nova E-gazeto pri *la kosmologio de Martinus* (dana verkisto kaj filozofo, 1890-1981), spirita scienco, priskribanta la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondon. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo.

La unua provnumero Kosmos 1/95 prezentas fundamenton de la scienco, prezentas liston de kosmologiaj verkoj en diversaj lingvoj (ankaŭ en E-o kaj en la ĉeĥa) kaj proponas abonon por 4 numeroj (20-paĝaj) jare (Martinus Institut, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago).

MOVILO

estas turisma oficejo en Budapeŝto (H-1157, Nyírpalota ut 107) por Esperantarangoj kaj informado, kiu okazigas por samideanoj de la tuta mondo interesajn programojn. Maje 1995 realiĝos en Budapeŝto konferenco pri ekonomio kaj Esperanto kaj Simpozio de Esperantoturismo pri novaj rimedoj kiel disvastigi Esperanton. Kiu volas plibonigi sian lingvoscion, povas julie viziti Esperantolingvotendaron en Százhalombatta-Boate-

jo. En aŭgusto kunvenos en grandebenaĵo Hortobágy la naturprotektantoj, kaj oktobre Balatono bonvenigos esperantistojn el landoj najbaraj al Hungario. La prezoj por unu nokto/persono (8-15 USD) diferencas laŭ loko kaj jarsezono. En Hungario meritas viziton ne nur la ĉefurbo, sed ankaŭ aliaj urboj. En multaj el ili vi trovos ankaŭ esperantistojn. Movilo povas efektiviĝi aranĝojn en Hungario ankaŭ por alilandaj asocioj.

„La Espero el Koreio“ adiaŭas

Unu el la plej belaj Esperanto-revuo *La Espero el Koreio* post 15-jara aperado ĉesas ekzisti pro perdo de registara subvencio. Dum la „malvarma milito“ la korea registrado vidis en la revuo rimedon kiel informi pri Koreio en la socialismaj landoj, sed post la falo de la komunismo la bezono ne plu estas sentata. Korea E-Asocio ne kapablas per propraj rimedoj financi la gazeton en luksa formo kaj restos nur modesta *La Lanterno Azia*, kiu aperadis ankaŭ nun, sed sole enlande.

Bonvenon al Grodno!

Skribas al vi esperantistoj el bjelorusa urbo Grodno, kiuj tre deziras havi rektajn kontaktojn kun viaj E-klubo kaj interŝanĝi informojn. Ĉi-somere multaj eŭropaj esperantistoj veturos tra Grodno al Tampere (UK), al Sankt-Peterburgo (TEJO-kongreso) kaj al Kaŭnas (KELI-kongreso). Grodnaj e-istoj preparas antaŭkongresan renkontiĝon (28/31-07-95), al kiu jam aliĝis 200 samideanoj. Eblas do plenumi vakuon en niaj kontaktoj, tiom pli, ke Grodno estas sidejo de Asocio Esperantista de la Respubliko Bjelorusio. (*Genadzij Kurgun, prezidanto de la klubo „Espero“*)

Ĉu vi konas kuracajn kolorajn foliojn?

Ĉeĥa inventistino vivanta en Germanio, samideanino Věra Suchánková (1918), kiu amike rilatas membrojn de la esperantista klubo Ponto en Pisek, evoluigis sistemon de koloraj folioj VERANA, kiuj helpas venki psikajn kaj aliajn sanproblemojn. La sistemon ŝi patentis en Munkeno, kaj nun ĝi estas uzata en 7 landoj, ankaŭ en la praga hospitalo „na Homolce“. Per la koloraj folioj eblas kuraci multajn malsanojn, ekzemple kancerajn tuberojn, dolorojn en la dorso aŭ en la artikoj, malfacilaĵojn de la koro kaj de la animo. La folioj estiĝas per kungluado de koloroj kaj ricevas esperantlingvaj nomojn, ekz. „Rose, energio K 44, Mia spirita frato“ ktp. Mi konatiĝis kun ŝi en Frankfurto antaŭ kvin jaroj, kiam mi grave malsanis, kaj ŝi ne nur helpis min, sed eĉ lemigis al mi sian metodon (kiun mi kompreneble ne volas teni sole por mi mem).

Ladislav Hruška, Milady Horákové 1648, 397 01 Pisek.

SOMERA ESPERANTO FAMILIA TENDARO

okazos de la 29-a de julio ĝis 6-a aŭgusto 1995 en tendejo „Zeltplatz am Dreetz-See“ Thomsdorf, regiono de urbeto Felberg. La tendaranoj uzos Esperanton de mateno ĝis la nokto, ĝuos migradojn tra la naturo, ekskursojn, vesperajn kunvenojn, prelegojn, ĉiuvesperajn fabelhorojn kaj banadon. Informojn petu ĉe la adreso: **Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104, D-17034 Neubrandenburg, ☎ 0395/ 4221398.**

RNDr. Evžen Wohlgemuth La vivo de efemeroj

La efemeroj (ĉeĥe „jepice“) estas konata grupo de insektoj. Kutime oni uzas la vortojn „efemera vivo“, kiuj signifas ion tempe tre mallongan. Kiel vivas la efemeroj, ke ilia nomo fariĝis tiel konata? La efemeroj - memstara ordo de tre primitivaj insektoj - havas diversajn grandecojn, la plej grandaj atingas longecon de la korpo ĝis 20-25 mm. Sur la brusto ili havas 2-4 parojn de flugiloj. Ĉi tiuj flugiloj estas triangulformaj, la antaŭa paro estas pli granda ol la malantaŭa, kiam la efemero sidas, starigas siajn flugilojn same kiel tagaj papilioj. Sur la fino de la abdomeno havas efemeroj 2-3 longajn kaj maldikajn apendicojn. La efemeroj vivas ĉe akvoj, oni povas vidi ilin precipe sur plantoj. Ili ne havas buŝon, tial ili ne povas sin nutri. Sekve de tio ilia vivo estas tre mallonga, plimulte nur iom da horoj aŭ tagoj. Unu sola funkcio de la vivo de maturaj efemeroj estas reproduktado.

La ovoj estas metataj en akvon, ĉe kelkaj specioj en stagnantan, ĉe aliaj en fluantan. Ĉi tie eloviĝas larvoj. Ilia korpo estas longforma, kun folioj de traĥeaj branĝoj sur flankoj de abdomenaj artikoj kaj kun 3 longformaj apendicoj sur fino de abdomeno. La larvoj vivas sian tutan vivon, kiu daŭras ĉe grandaj specioj 2-3 jarojn, ĉe malgrandaj 1 jaron, en akvo. Ili voras algojn, restojn de plantoj, organikajn restojn ktp. Kreskantaj larvoj estas ĉe grandaj specioj ĝis 30 mm longaj. Ili elgrimpos el akvo, la haŭto sur ilia brusto krevas kaj aperas la matura efemero. Apenaŭ sekigiĝinte ĝi ekflugas.

Ĉe ni vivas ĉirkaŭ 80 specioj de efemeroj. Iliaj larvoj estas tre abundaj en diversaj

tipoj de akvoj, la larvoj de iuj specioj indikas puran akvon. La larvoj de efemeroj estas grava parto de fiŝa nutraĵo. La grandaj specioj de efemeroj en la pasinteco abundis en grandaj riveroj. La maturaj efemeroj ekflugis tie en grandaj amasoj. Ankoraŭ nuntempe oni povas vidi svarmojn de efemeroj, kvankam ne tiel grandajn kiel antaŭe.



Sur la bildeto estas matura efemero kaj larvo de la duflugila efemero. Larvoj de ĉi tiu specio (elkreskintaj longas 7-10 mm) vivas en stagnantaj akvoj, ofte ankaŭ en ĝardenaj basenoj. Maturajn efemerojn oni povas vidi ankaŭ en urboj sur dommuroj, pordoj, fenestroj ktp.

Oniskoj kaj aselinoj


Oniskoj kaj aselinoj estas malgrandaj krustuloj, formantaj kune grupon de izopodoj.

La oniskoj (ĉeĥe nomataj "berušky stínky" aŭ "svinky") havas korpon ovoforman, platan kaj grizan, artikiĝitan, longan 10-15 mm, kun 7 paroj da piedoj. Vivante en malsekaj lokoj, en arbaroj kaj ĝardenoj sub ŝtonoj, lignoj kaj sub falinta foliaro, kaj ankaŭ en domaj keloj kaj malsekaj ĉambroj. Ili voras restojn de plantojn, ŝimaĵojn kaj similajn substancojn - tiamaniere la oniskoj partoprenas en malkomponiĝo de organika materio kaj utilas por la naturo. Sed en la domoj ili difektas deponitajn fruktojn kaj legomojn, kaj homoj ilin abomenas. Krustuloj kiel plejparte akvaj animaloj spiras per branĵoj, sed ĉe oniskoj la branĵoj ŝanĝiĝis je spirfolietoj, situantaj en subo de la abdomeno. La folietoj ĉiam devas esti malsekaj.

Same interesa kiel la spirado estas la generado. Femalo portas inter piedoj sub sia korpo fekundigitajn ovojn, el kiuj eloviĝas post ioma tempo malgrandaj blankaj oniskidoj.

El la aselinoj vivas en nia lando nur unu specio, griza aselino (ĉeĥe "beruška vodní"), loĝanta en stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj. Ĝia korpo, ankaŭ griza, plata kaj artikiĝita, 10 - 12 mm longa, havas nur 6 parojn da piedoj. Ankaŭ aselino voras restojn de plantoj, kaj femalo portas inter piedoj sub la korpo fekundigitajn ovojn, el kiuj naskiĝas blankaj aselinetoj. Sed aselino spiras kiel ceteraj krustuloj per branĵoj situantaj en subo de la abdomeno. En la akvo ĝi tre utilas. Vorante restojn de plantoj aselino helpas al malkomponiĝo de organika

materio kaj mem servas kiel nutraĵo de fiŝoj.



Ankaŭ malgrandaj animaloj havas interesan vivon kaj gravan rolon en la naturo.

... skribis leganto:

Dankon por Starto 5-6/94. Mallonga estas la rubriko „Korespondi deziras“, ĉu oni pagas ion por publikigo de la „deziroj“? (*Nenion - rim. de redaktoro.*)

Bonvena estas al mi „vortareto“ (p. 17) - kelkaj esprimoj estas vere bezonaj -, sed esperantlingvaj artikoloj estas tro longaj kaj ampleksaj. Ne malhelpus koncizeco kaj pli da kompreneblaj praktikaj esprimoj. Ekzemple kiel diri „Ĉesko“, ĉu „Bohemiano“?

Boris Uher, Brno
Opinio de la redaktoro: Bohemio + Moravio + Silezio = Ĉeĥio (teritorio, kie vivas ĉeĥoj)

PIV - nova eldono

Sennacieca Asocio Tutmonda, eldoninta *Plenan Ilustritan Vortaron* en 1970 kaj *Suplementon* en 1987, preparas novan eldonon de tiu ĉi plej grava vortaro en Esperantio. Malgraŭ sia neoficialeco la verko pro siaj kvalitoj akiris plej altan respekton kaj aŭtoritatecon. Tamen, ankaŭ ĝi enhavas preserarojn, nesufiĉajn difinojn kaj aliajn mankojn, kiujn korekti kaj el-sarki povas nur la tuta esperantistaro. La reviziantoj do kolektas rimarkigojn de ĉiuj esperantistoj, kiuj havas ideojn por plibonigo de la vortaro, kiuj rimarkis mistajpajojn aŭ erarojn. Se vi havas tiajn rimarkojn, vi povas skribi al la respondeculo pri la reviziado: **s-ano Michel Duc Goninaz, Val saint-Georges, Chemin de l'Echelle, FR-13000 Aix-en-Provence.**

La malbeno de neglositaj neologismoj

Bernard Golden

En sia pens-stimula artikolo "Pri tradukado de beletro" (Starto 3/1994 [160], pĝ. 13-15) Miroslav Malovec surpaperigas plurajn valorajn konsilojn kaj gvidliniojn por plenumado de bona traduklaboro. Tamen, mankas en lia prezentado pritrakto de grava punkto: la rilato inter la lingvonivelo de tradukantoj kaj legantoj. Plej ofte la lingvo de tradukado ne estas la gepatra lingvo de la tradukanto; lia lingvo estas la cellingvo, pri kiu li estas pli kompetenta, kaj tiu lingvo estas ankaŭ tiu de la plej granda parto de la legantoj de la tradukita verko. Problemoj ĝenerale ne estiĝas, krom se sklaveca traduko de frazeologiaj esprimoj aperantaj en la detraduka lingvo okazigas nekom-

prenon aŭ miskomprenon.

La rilaton inter la du flankoj de traduklaboro estas iom pli komplika en la kazo de altraduko en Esperanto, ĉar povas okazi, ke tradukanto, volante tre precize esprimi ion en la detraduka teksto, donas al ordinara Esperanta vorto specialan sencecon aŭ nuancon, kiun la etnolingva ekvivalento posedas, sed kiu estas nekonata en Esperanto. Eĉ pli misefika povas esti enkonduko de neologismoj, ĉar tradukanto neniam povas esti certa, ke legantoj komprenos tiajn vortojn, eĉ tiujn, kiujn oni false nomas "internaciajn". Se tradukanto sentas, ke neologismo estas nemalhavebla en la tradukaĵo, kaj tiu vorto ne estas registrita en **Plena Ilustrita Vortaro kaj Suplemento (PIVS)**, li devas glosi ĝin, jen en la formo de piednoto, jen en aparta glosaro ĉe la fino de la verko. Se li ne degnas tiel plivalorigi sian tekston, tiu respondeco apartenas al eldonanto aŭ redaktoro okaze de publikigo. Bedaŭrinde, mi trovis, ke en lastatempe aperintaj numeroj de **Starto** mankas bezonataj glosoj. La sekvaj citaĵoj enhavas vortojn, kiuj ne estas registritaj en PIVS. Kie, do povas legantoj informiĝi pri la signifoj?

1. "Multajn ekzemplojn de tiaj **etnofaŭlismoj** citas A. A. Roback en sia libro 'A Dictionary of International Slurs' ..." (1/2 1994 [159], pĝ. 10). En PIVS "faŭli" estas sporta faktermino.
2. "... pastro Zbořil tiel grave rompis al si la gambon en la kokso, ke li restos **lazara** ĝis la morto" (1/2 1994 [159], pĝ. 18). La vortaro registras nur la propran nomon "Lazaro", ne la adjektivon "lazara".
3. "Niaj 'spongoj' el **molitano** kaj gumo estas artefaritaj anstataŭaĵoj, al kiuj restis nur la nomo" (1/1994 [154], pĝ. 15). "Molitano" mankas en PIVS.

4. "La avinon Malvína, kiu riproĉis avon Ferdinandon, ke li ludas **mariaĵon**, oni jam laŭdire gasmortigis en Oswiecim" (2/1993 [155], pĝ. 17).

"**Mariaĵo**" ne estas registrita en PIVS.

5. "Aliflanke kreskis la **poligrafia** kvalito de Starto" (6/1992 [153], pĝ. 15).

La radiko "poligrافي-" aperas ofte en **Starto**, sed PIVS ignoras ĝin. Ĉu povas esti, ke malgraŭ la formo, ĝi vere ne estas "internacia"?

6. "... en nia lando iom-post-iome kreskas intereso pri la aferoj de naturkuracado kaj **psikotroniko** ..." (2/1993 [155], pĝ. 12).

PIVS registras "psikotekniko" kaj "psikoterapio", sed ne "psikotroniko".

7. "Mortas ankaŭ la **senioro** de la ĉeĥfrata eklezio kaj Komenio fariĝas ĝia lasta episkopo". (2/1992 [149], pĝ. 6).

En PIVS troviĝas la paronima vorto "senjoro", kies difino priskribas sekularajn funkciulojn. La singifo de "senioro" devas esti tute alia.

8. "Esperantista klubo en Plzeň renkontiĝas lunde en propra klubejo en la strato Veleslavínova n-ro 14 danke al la '**sponsoranta**' prezidanto Jiří Vomáčka" (6/1992 [153], pĝ. 6).

Ankaŭ ĝi mankas en PIVS. Kial ĝi estas presita inter citiloj en **Starto**? Ĉu ekzistas necerteco pri ĝia formo kaj signifo?

Esperable en la estonteco vortoj kiel tiuj listigitaj ĉi-supre ricevos adekvatajn glosojn fare de la redakcio de **Starto**.

La malfruigintaj glosoj de la redakcio:

1. **etnofaŭlismo** - ĉar la aŭtoro, mond-fama pola poeto Julian Tuwim, mortis en 1953, ni ne povas demandi pri la klarigo; tamen laŭ la ĉirkaŭteksto eblas kompreni, ke temas pri frazeologiaĵo fontanta el etna

lingvo kaj en Esperanto nekomprenebla
2. **lazara** malsana kiel Lazaro antaŭ morto

3. **molitano** spongeca plasto

4. **mariaĵo** kartludo por tri ludantoj (el la franca **mariage** = geedziĝo), eble identa kun la kartludo **brisko** (Grand Dictionnaire Francais-Esperanto, pĝ. 120) (la identigo de ambaŭ ludoj estas trovebla en ĉeĥa-franca vortaro)

5. **poligrafio** presarto (vidu la vortaron "Deutsch-Esperanto" de Krause, pĝ. 361, laŭ PIVS **tipografio**)

6. **psikotroniko** kuraca metodo de telepatianta kuracanto

7. **senioro** supera funkciulo en la ĉeĥfrata eklezio, membro de **seniorato** (konsilio de la plej aĝaj kaj saĝaj)

8. "**sponsorado**" financa subteno de kulturo, kiun firmao povas dealkuli de impostoj kaj samtempe reklami sian entreprenon (la verbo "sponsori" aperis en "Esperanto 10/1991 [1030]", pĝ. 195); niaj citiloj signifas, ke temas pri financa helpo nur simila al sponsorado; en la granda franca-Esperanta vortaro ni trovas: **sponsoring** patroneco (pĝ. 808)

(mm)

"**Korean vesperon**" prezentis en februaro, en E-Klubo Praha, tri junaj gekoreoj (laŭ AdE: gekoreanoj), kun rakontado kaj popolaj kantoj. Unu junulo el ili, lerninta ĉe s-ino Chrdlová en Seulo, alparolis plejparte ĉeĥe, fierante pri la rezulto de sia studo de tiu lingvo.

24.02.95 (J.M.)



**Homonimoj en Esperanto,
Konsiderataj nomenklature (3)**

Josef Kavka

-IS- kaj -ID-

Post pritrakto de la du antaŭaj problemoj (v. STARTO, 1994, 4, 20-21, kaj 5/6, 23-26) ni povas alpaŝi la trian. Temas pri la fakto, ke inter Esperanto-terminoj aperas tiuj kun la radikfina **-IS-**, por eviti homonimecon kun la sufiksa **-ID-**, dum la radikfina **-ID-** prave respektus la fontlingvajn, eĉ internacie kodigitajn originalojn kaj bone koherus kun terminoj parencaj.

Tamen, oni devas zorge distingi:

1. En la tria latina deklinacio ekzistas vortoj, kies nominativo kaj genitivo estas samformaj, ekz. *anguis* (prononcu *angvis*). Ĝia **neoficiala** ekvivalento esperantlingva estas laŭ PIV „angviso“. Laŭ nia nomenklature motivita opinio, pli taŭga nomo estus **angvo**, ĉar tiu **-IS-** en la latina ne konsistigas la radikon; tion oni povas konstati jam en la dativo *angui*, kie la konsonanto **-S-** malaperas. Jen kial la zoologoj kodigis la familian nomon *Anguidae* (ne „*Anguisidae*“). En Esperanto tiu ĉi nomo devus esti **angvedoj** (ne „angvisedoj“). Analogan okazon prezentas la tasmania piprarbedo **drimo** el la familio de drimacoj. La PIVaĵo „drimiso, drimisacoj“ estas esperantigita malbonŝance. Ankaŭ la latina genronomo *Felis* apartenas tien ĉi. Pro timo antaŭ la homonimeco kun *felo*, PIV registras „feliso“. Estas evidente, ke la genronomo **felo** kaj la familinomo **feledoj** (latine *Felidae*) pli bone respregulus la zoologian nomenklaturon. Simile „maniso, manisedoj“ devus fariĝi **mano**, **manedoj**, kvankam mano generus homonimecon de

la membro kun la sendenta mamulo. Same „pieriso, pierisedoj“ estu **piero**, **pieredoj** (*Pieris*, *Pieridae*); ĉi-okaze la konata blanka papilio ne liveras homonimecon. Fine „vermiso“, laŭ PIV la vermoforma parto de la cerebelo devus pli nature esti simpla **vermo**, apenaŭ konfuzebila kun ekz. lumbriko, tamen elvokanta la verman formon.

Tute speciala okazo estas la PIVa „stakiso“ (*Stachys*). La koncerna modelo de la helena deklinacio estas *ichthys* = fiŝo. Ĉar tiu ĉi modelo konservas sian ipsilonon kiel radikparton, oni devus por Esperanto akcepti la radikon *iĥti-*, kp. la PIVajn: iĥtiofagio, iĥtiologo, **iĥtiokolo** (fundamenta), iĥtiosaŭro. Sekve ankaŭ: **stahio**.

Nu eble la paciencaj legantoj permesos kurtan deflankiĝon de nia temo. Nome, tiu iĥtiosaŭro kaj „stakiso“ okulfrape atentigas ĉiun biologon pri simptoma nomenklatura nekohereco en PIV: dum la zoologiaj nomenklaturaĵoj respektas la zamenhofan, fontlingvan kaj internacian fonemon ĥ, la botanikaj konsekvence misformas ĝin per K. Tiu ĉi procedo nepre fortimigas scienlistojn.

2. Alitipan negativon, ol la pli supre menciitan, sed same en la tria latinlingva deklinacio, ni trovas jen: dum en nominativo estas **-is**, en genitivo estas **-idis** (helenlingve **-idos**). Kiel unuan ekzemplon ni prenu la nomon de rivereto deklive de la sicilia vulkano Etno: latine *Acis*, **-idis**, helene *Akis*, **-idos**. Evidente, la nomo en Esperanto devus esti **Akido**, ne „Aciso“ laŭ PIV. La saman nomon portis paŝtisto, amanto de la nimfo Galateo. Interesan heziton inter **-IS-** kaj **-ID-** prezentas PIV jen-okaze: apud la botanika **adonido** figuras la mitologia „Adoniso“.

Pli ĝuste, la filo de la cipra reĝo devus esti nomata **Adonido**, dum la ĉarma printempa orflava floro *Adonathe vernalis* devus esperantigi kiel **adonanto**. Aliflanke, *Adonis sestivalis* restas adonido. Nature, kiel ĉiu verko, ankaŭ PIV antikviĝas ne sole el lingva, sed ankaŭ - interalie - el botanika vidpunkto ...

Bedaŭre, mankas loko por detale pritrakti unuopajn okazojn. Ni kontentigu nin per elnombrado de jenaj (enkrampe la PIVaj formoj): Alkestido („Alcestisa“), Artemido („Artemisa“), Baŭkido („Baŭcisa“); Ĥlorido („Klorisa“) ne estas sole virina nomo, kiel asertas PIV, sed estis helena flordiino; Irido („Irisa“) estis diino de ĉielarko kaj la floro irido ricevis sian nomon laŭ ŝi; ankaŭ la oficiala „iriso“ devus resti - kvankam homonime - irido; Tetido („Tetiso“), la mardiiino donis nomon al la pramaro Tetido (laŭ PIVS: „Tetiso“); Temido („Temisa“) estis helena diino de justeco.

Kvankam fundamentaĵoj, kiu misformus la radikfinan -ID- per -IS-, ni ne trovas, tamen ekzistas du zamenhofaj precedentoj: „Pariso“ kaj „Tespiso“. Laŭ la pli posta praktiko de Zamenhof, pli naturaj estus Parido kaj Tespido.

Neple korektendaj estas jenaj du **neoficialaj** nomoj: „berberiso“ kaj „daktiliso“. Devas esti **berberido** el la familio de la poacoj (laŭ PIV „graminacoj“). Fine restis unu kaloĉaja **oficialaĵo** „lapiso“, la nitrato arĝenta. Devus esti **lapido**, kohera kun *lapidara, lapidario* k.a.

La en PIV registrita skaraba genronomo „kopriso“ (*Copris*) ne plu estas uzata fare de l' entomologoj.

Klaran direkton por esperantigi la latinajn vortojn de la tipo -is, -idis donus la **fundamentaĵo** kantario (*Cantharis*), se ne

temus pri la problemo, kiel nomi la koncernan familion (*Cantharidae*). La solvo: **kantaro** (kvankam homonima kun kantaro) por la genro, **kantaretoj** por la familio.

Perfekte procedis *Zamenhof* okaze de la same **fundamentaĵo**: **aspido** (latine kaj helene *Aspis, -idis, -idos*). Li ja bone regis ambaŭ antikvajn lingvojn, do ne esperantigis la serpenton per „aspiso“. Cetere, li ne timis -ID- kiel radikparton, kvankam ĝi foje kondukis al homonimeco: avid-a kaj av-ida, decid-o kaj dec-ido, prezid-o kaj prez-ido, rapid-a kaj rap-ida. Ni povus menciigi ankoraŭ plurajn ekzemplojn, tamen ni finu per la zamenhova *Taŭrido (Taurois)*.

Sed nun ni esploru **oficialaĵojn**: iridon ni tuŝis jam pli supre; okaze de *humida* oni ne timis *hum-idon*; sed plej demonstriva estas piramido (*pyramis, -idis*): oni ne aŭdacis esperantigi per „piramiso“ konforme al la pli supre tuŝita „lapiso“.

Da **neoficialaj** PIVaĵoj kun la radikfina -ID- estas inundo, neple praviganta nian nomenklaturan starpunkton „kontraŭlSan“; afido (*Afis*), afidedoj (*Aphididae*), agrostido (*Agrostis*), amarilido (*Amaryllis*), amirido (*Amyris*), antemido (*Anthemis*), antilido (*Anthyllis*), arakido, pli ĝuste arahido (*Arachis*), askarido (*Ascaris*), Atlantido (*Atlantis*), Aŭlido (*Aulis*), celtido (*Celtis*), dorido (*Doris*), emido, emidenoj (*Emys, Emydinae*), Eneido (*Aeneis*), epakrido (*Epacris*), erantido (*Eranthis*), fizalido (*Physalis*), Forido (*Phoris*), hamamelido (*Hamamelis*), hipurido (*Hippuris*), izatido (*Isatis*), karotido (helene *karotis*), kaŭkalido (*Caucalis*), klamido, ĝuste ĥlamido (*chlamys*), klematido (*Clematis*), kobitido (*Cobitis*).

Ĉe la terura PIVa kriplaĵo „Kolĉido“ ni

devus iomete halti, kvankam pro alispeca motivo. Ja Zamenhof, respektante al la fontlingvo, lanĉis la formon **Kolhido** (*Colchis*). La PIVan fonetikan monstron bonvenigus eble tiu, kiu esperantigus la mineralnomon *halkopirito* per „ĉelkopajrajto“. Anstataŭigi la helenan Ĥ, ĉu per Ĉ, ĉu per K estas simpla perforto. Oni devas admiri la verkegon, kia estas PIV, el vidpunkto komuniza. El nomenklatura oni konstatas bedaŭrindan nekoherecon fonetikan, kiel ni aludis jam pli supre. Sed plej kondamninda estas tio okaze de terminoj sametimaj: ekz. apud la ĝustaj zoologiaĵoj *ĥondrostomo*, *ĥondrosteo* ni trovas la medicinaĵojn *kondro*, *kondromo*, *kondrito*. Aŭ: la medicinistoj redaktante PIV ne komunikis kun la zoologoj: *spiroketo* kaj *polihetoj*. Estas evidente, ke por venonta PIV-eldono necesos leksika revizio. Jen urĝa tasko por Akademio de Esperanto.

Pardonpete, post la fonetika halto, ni daŭrigu la morfologian elnombradon de l' -ID-ajoj: *krepido* (*Crepis*), *kuspido* (*cuspis*), *liknido*, *ĝuste lihnido* (*Lychnis*), *mirido* (*Myrrhis*), *oksalido* (*Oxalis*), *orkido*, *ĝuste orĥido* (*Orchis*), *otido* (*Otis*). *Piknido*, *ĝuste piknidio* (*pycnidium*) ne apartenas al nia -IS- problemo.

Fine restas: *pterido* (*Pteris*).

Konklude, sur la fono de tiom multaj, ĝuste esperantigitaj nomoj kun la radikfina -ID-, ni povas nur miri, kial en la leksikon de Esperanto enŝteliĝis „beriberiso, daktiliso“ k.a. Ja la -ID-tendenco estas nekontestebla. Apenaŭ iu timos konfuzon inter karotid-o kaj karot-ido. Same, oni ne konsideros kobitidon kiel idon de iu „kobito“.

Konforme al ĉio ĉi, ekz. en botaniko por la bela *Bellis perennis* devus figuri **belido** (ne „beliso“) **perena**. La koncerna funda-

menta popolnomo „lekanteto“ plu servu en infanlibroj, poemoj k.s.

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

Pri esperantigo de la botanika nomenklatur (1982). *J.Kavka*. - Scienca revuo, 3(141), 77-86. *Pisa*.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). *B. Pabst*. - Esperanto-Centro, Paderborno.

FRANTIŠEK KOŽÍK KAJ ZAMENHOF

Jaroslav Mařík

Aŭdinte en Radio la faman verkiston František Kožík, mi letere memorigis al li malnovan sugeston de Jiří Karen, ke li povus verki romanon pri L. L. Zamenhof, kies lingvon li estas lerninta en Brno kaj uzinta en la tiuloka Verda Stacio. Li tiam respondis al Karen, ke lin devus atingi la „motivo“ (ekz. detala informaro), kiu povus lin inspiri. Nun en sia februar-fina letero s-ano Kožík skribas al mi (*ĉeĥlingve - rim. de red.*):

„...Laŭdinde, ke vi mencias pri esperanto - mi havas agrablajn rememorojn pri la elsendoj de Brno (Verda Stacio). Mi eĉ faris esperantlingvan raportajon el la lasta Sokol-Festivalo. - Materialon pri Zamenhof mi havas, mi provis tion, sed mi iel ne sukcesas en tio. Via sugesto min eble enigis ripeti la provon ... sed vi scias, mi surportas multajn jarojn kaj mia iama freŝo jam laciĝis. - Pri Höger, Leraus mi ŝate rememoras. Bedaŭrinde, ili ne plu estas kun ni kaj ankaŭ mia edzino Zdenka

(*Svábiková-Kožíková, Verdstacianino - rim. de J.M.*) en la pasinta jaro adiaŭis tiun ĉi mondon“.

Mi sendas al s-ano Kožík pluan biografion de Zamenhof, kiun legante eĉ ek-larmis la patrino de nia Mikuláš Nevan. Mirigas min tiu raporto pri la „Sokol-Festivalo“. Ĉu lasta antaŭ la milito? Rektan raportaĵon pri la efektive lasta Festivalo (1948) por la Esperanto-elsendoj de Radio Praha estas farinta mi, ne sciante pri analoga faro de Kožík. - Leraus estis dezirinta renovigon de E-elsendoj.

Ni deziru al nia samideano, ke la Anĝelo de Inspiro kisu lian vangon.

14-a Internacia Literatura Foiro

okazos en la pola Gdansko inter la 15-19 julio 1995 kun interesaj prelegoj, riĉa kultura kaj distra programo pri *Amo en poezio kaj en prozo* kaj unutaga ekskurso. Organizas kune Kooperativo Literatura Foiro kaj Junulara Kreema Klubo PALMA. Tranokto kun tuttaga manĝo estas ĉ. 17 USD por tago/persono. Programo sen ekskurso por eks-socialismaj landanoj estas 40 frankoj ĝis 20a de junio kaj 60 frankoj poste. Pliajn informojn kaj aliĝilojn: Kongresfako de LF-koop, c/o Esperanta PEN/Centro, Pf. 117, H-1581 Budapeŝt, Hungario.

LA 48-KONGRESO DE IKUE

En Olomouc okazos en la tagoj 8. - 15. 7. 1995 la 48-a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Sian partoprenon promesis ankaŭ la ĉefepiskopo Miloslav kardinalo Vlk kaj ĉefepiskopo Graubner. La kongreso estas la plej grava Esperanto-aranĝo en nia lando en 1995

Novaj ĉeĥaj sanktuloj

Sankta Rastislav

(fino de 9a jc.)

La ortodoksa eklezio kanonizis komence de 1995 la moravian princon Rastislav (Rostislav, Rastis), kiu venigis Cirilon kaj Metodon en nian landon.

En la jaro 814 mortis Karolo la Granda, kaj en 843 disfalis lia Franka regno, kio ebligis memstariĝon de Francujo, Italujo kaj Germanujo. La ambiciojn de Frankujo heredis la Orientfranka regno, kies suvereno Ludoviko Germano, la nepo de Karolo la Granda, elektis kiel sian regejon la urbon Regensburgo. Tiamaniere la centro de la orienta ekspansio de Frankoj proksimiĝis al slavaj landoj. En 845 akceptis 14 bohemiaj princoj en Regensburgo bapton kaj tiel ili subiĝis al la germana regado. Sed ankoraŭ pli frue la germana influo, disvastigata pere de la nova kredo, atingis Slovakion: nelonge antaŭ la jaro 830 princo Pribina, kvankam mem pagano, konstruigis en Nitra preĝejon de sankta Emmeram, patrono de Bavarujo. En 830 estis Pribina elpelita de la moravia princo Mojmir, sed en 840 li (Pribina) akceptis de frankoj bapton kaj regadon en Panonio (nuntempa Hungario); post lia morto en 861 fariĝis princo de Panonio lia filo Kocel.

Per anekso de Slovakio al Moravio formiĝis la Grandmoravia regno, kaj Mojmir regis kiel ĝia unua princo. Moravianoj jam konis la kristanisman, disvastigatan de la germanaj misiistoj. Ludoviko Germano en 846 detronigis la princon Mojmir kaj instalis lian nevon Rastislav en Moravio kaj samtempe ties nevon Svatopluk en Slovakio.

Rastislav ĉirkaŭ 850 atingis sendependecon je la Franka regno kaj elpelis

la germanajn misiistojn. Tial Ludoviko Germano en 855 ekmilitis kontraŭ Rastislav, sed senrezulte, lia armeo estis haltigita. Malgraŭ la sukcesoj Rastislav komprenis, ke lian ŝtaton povas subteni nur eklezia organizo, tial li sendis al Romo peton pri propra episkopo kaj episkopejo. La papo Nikolao I-a, favoranta la frankan reĝon, la peton rifuzis. Sed Rastislav turnis sin (kune kun Svatopluk) al Konstantinopolo (Istanbulo): en 863 la bizanca imperiestro Mikaelo III-a sendis al Moravio sian eminentan kortegan scienciston Konstantinon, kiu - devenante el la greka urbo Saloniko (Tesaloniko), najbara al slavaj triboj - ne nur sciis slave, sed eĉ kreis skribon taŭgan por la la slava lingvo. Konstantino enslavigis liturgiajn tekstojn kaj post jaroj ankaŭ Biblion (tiam ankoraŭ ekzistis nur unu slava lingvo kun reciproke kompreneblaj dialektoj). Konstantinon akompanis lia pli aĝa frato Metodo, antaŭe imperiestra guberniestro inter slavoj, poste monaho. La fratoj tri jarojn aktivis en la moraviaj princlandoj kaj ankaŭ en Panonio de Kocel, enkondukis la slavan lingvon en diservon kaj post reveno en Romon ili sukcesis elpeti de la papo Hadriano II-a aprobon de la slava liturgio. Konstantino en Romo fariĝis monaho sub la nomo Cirilo (tial lia skribo, uzata de rusoj, serboj kaj bulgaroj, estas nomata cirila alfabeto) kaj baldaŭ mortis. Metodon la papo ordinis ĉefepiskopo panonia kaj moravia kaj sendis reen al la slavoj laŭ peto de Kocel.

En aŭgusto 869 frankaj trupoj invadis Moravion kaj sieĝis la fortikajon Dowina (Děvín apud Bratislava) de Rastislav, sed ne konkeris ĝin. Venĝe ili dezertigis kaj elrabis Moravion, sed Rastislav ne estis venkita kaj ne perdis

sendependecon de sia ŝtato. Tamen al ĉi tiu eminenta kaj saĝa slava reganto la sorto ne permesis fini la ŝtatestran laboron. Lia nevo Satopluk, ĝis tiu tempo vasala princo en Nitra, komence staris ĉe flanko de sia onklo Rastislav kontraŭ frankoj. Sed poste li eksopiris regi mem la tutan moravian ŝtaton kaj en 870 perfide kaptis la onklon kaj sendis lin katenita al Karlman, filo de la franka reĝo. Ĉe pompa juĝo en Regensburgo estis Rastislav, katenita per ĉenoj, kondamnita de la reĝo Ludoviko al morto, sed poste pro pardono „nur“ blindigita kaj enkarcerigita en iu bavara monaĥejo, kie li vegetis ĝis la morto. En 870 estis kaptita kaj enkarcerigita de la germanaj episkopoj ankaŭ la ĉefepiskopo Metodo kaj nur en 874 la papo atingis lian liberigon kaj revenon en la diecezojn moravia kaj panonia. En 885 Metodo mortis, nova papo malpermesis la slavan liturgion kaj la disĉiploj de Metodo estis elpelitaj (sen vestoj kaj en frosto) el Moravio al Bulgario.

Svatopluk poste sukcesis aneksi ankaŭ Bohemion kaj Panonion, sed post lia morto en 894 liaj filoj interbatalis kaj estis venkitaj de hungaroj, kiuj tiutempe invadis Eŭropon.



La 21-an de majo 1995 la papo kanonizos en Olomouc du novajn katolikajn sanktulojn.

Sankta Zdislava de Lemberk (1220-1252)

Post sanktaj Ludmila (†921) kaj Agnesa Bohemia (1205-1282) la nomo de alia eminenta virino brilas sur la ĉeĥa ĉielo. Sankta Zdislava naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1220 - do mallonge antaŭ la morto de sanktaj Dominiko (1221) kaj Francisko de Asizo (1226) - en moravia burgo Křivanov, kiel unuenaskita filino de la ĉeĥa grandsinjoro Přibyslav kaj lia edzino Sibila, devenanta el Sicilio. En la Bohemia-Moravia montetaro Zdislava travivis feliĉan infanaĝon en kredanta familio. Ŝi edziniĝis tre juna al sinjoro Havel kaj foriris kun li al lia burgo Lemberk apud Jablonné v Podještědí en norda Bohemio. Ĉar ŝi alkitimiĝis jam de junaĝo plenumadi siajn devojn al Dio kiel modela kristana knabino, ŝi plenumadis ilin ankaŭ koncerne sian edzon kiel modela edzino kaj koncerne la infanojn kiel oferema patrino kaj kristana edukistino, koncerne al hejmanoj, vojirantoj, malsanuloj kaj anime kaj materie malriĉaj kiel domestrino, instruantino de la kristana doktrino kaj bonfarantino en la vasta regiono.

Komune kun sia edzo ŝi konstruigis la preĝejon kaj abatejon en Jablonné kaj Turnov por monaĥoj de la dominikana ordeno, en kiuj ŝi bone ekkonis, bonvenigis kaj subtenis viglan renesancan movadon de la tiama kristana mondo.

Sinjorinon Zdislava ornamas ne nur dominikana vestaĵo, sed antaŭ ĉio vera dominikana pieco, por kiu estas karakteriza vasta apostola agado, fontanta el regula meditema preĝo kaj praktika estimo al Di-patrino, tiel grava por sana

formado de kristanaj familioj. Zdislava estas plena de Dia Spirito kaj pro tio ŝi scipovas harmoniigi publikan agadon kun hejmaj devoj de patrino, edzino kaj dommastrino.

Ŝi atingas perfektecon en aĝo de Kristo. Ŝi mortas proksimume 32-jara, sed siajn kvar infanojn ŝi provizis per sistema kristana edukado jam sekure por la vivo.

Samtempuloj komencis pilgrimi al ŝia tombo en Jablonné kaj peti sinjorinon Zdislava pri supernatura pripeto kaj helpo tuj post ŝia morto. Ŝian proklamon de beateco konfirmis sankta papo Pio X-a la 28-an de septembro 1907 kaj la 21-an de majo 1995 ŝi estos kanonizita kiel sanktulino. Estas devo de nia generacio prezenti la junan Zdislava al la tuta mondo kiel reprezentantinon de eminentaj ĉeĥaj virinoj kaj patrinoj, kies karakteron formis Kristo.

Ĉiu epoko havas sian specialan starpunkton al socialaj rilatoj, vivmaniero, taksado de siaj idealoj. Se ni volus rigardi Zdislava-n per okuloj de lastaj cent jaroj, kiam emancipaj klopodoj liberigis al si vojon en la societo, kvankam ofte nur surpapere, tiam ni vere tre erarus kaj tio estus baza malkompreno de la epoko de Zdislava, por kiu emancipa problemo estus simple sensencaĵo kaj nekomprenebla afero. Temas ja pri epoko, kiam superrango de viroj rilate al virinoj estas natura kompreneblo, akompanata de kavalira estimo al virino kaj protekto de virinoj. Estas necese konsciiĝi, ke temas pri epoko, kiam al la edzino apartenas memkomprena kunlaboro ĉe la edzaj aferoj, fakta egalrajteco, pri kiu virino el la fino de la pasinta jarcento eĉ ne povis revii. Konsideru, ke la edzino restas en la burgo kiel suverena administrantino en hejma politiko por longa periodo de

kavaliraj militiroj. Ke dum la tuta tempo, kiam li defendas la komunan aferon malproksime sur la batalkampo, ŝi defendas la komunan aferon hejme. Ke al ŝi apartenas ne nur unufoje ankaŭ principa decidiĝo en batalsituacioj, kiam en aferoj militmetiaj ŝi havas ĉemane nur kastelestron aŭ iun alian viron. Dum foresto de la edzo ŝi simile estas regantino. Nenion ŝanĝas je ĉi tiu bildo tragikaj eraroj, nek ebleco kaj multaj kazoj de malfideleco je ambaŭ flankoj dum longa, foje eĉ kelkjara foresto, kiu estis unu el la plej grandaj malfacilaĵoj de la tiama vivo en edzeco.

Nek baroka tempo nek burĝa epoko scipovas kompreni situacion de burĝestrino, kiu estas de mateno ĝis vespero okupata kiel dommastrino kaj administrantino de la vasta viva organismo de la burĝa ekonomio. Necesas bone vidi, ke burĝa estrino estas virino de laboro, virino, ĉe kiu eĉ dumnokte ne estingiĝas lumo, virino ellitiĝanta pli frue ol aliaj kaj enlitiĝanta la lasta, servante al ĉiuj, kiuj kreas burĝan komunumon. El ĉi tiu sperto ŝi povas bone kompreni, kion bezonas tiuj, kiuj laboras, interveni objektivite kaj ĝustatempe en la sorton de la bezonataj. Al ŝia sankta renomo kontribuas ankaŭ kompata rilato al proksimuloj, montriĝanta ne nur per intereso pri malsanuloj en unuopaj kazoj, sed ankaŭ per klopodo pri efika vasta helpo ĉe fondo de la hospitalo.

Kion ni jam diris, ni povas resumi tiel, ke Zdislava estis justa, afabla, helpopreta, honesta kaj ĉasta burĝsinjorino. Sinjorino Zdislava nome estas antaŭ ĉio la Sinjorino. Ĉi tiu vorto plej fidele prezentas ŝin.

Sinjorino nome estas nek edzino nek neĵuna virino, kiel ŝajnas el nuntempa

lingvouzo. Sinjorino estas virina vidalvidulo de la vorto kavaliro. Sinjorino estas kavaliro virino. Virino libere reganta pri komisiita posedaĵo. Ŝi estas virino havanta aŭtoritaton kaj kun ĝi nedividoblan respondecon. Apud sia edzo ŝi estas centro de la familio, edukantino de la infanoj, protektantino de la ordo kaj bonfarto en la domo. Kiel patrino ŝi estas en ĉio kaj ĉiam kunkreinto kaj kunportanto de la gepatra aŭtoritato. Sinjorino Zdislava ne estas zorgokonsumata pro la devigo, sed ŝi estas klara kaj brava virino, ĝoje kaj ankaŭ en tempoj de obstakloj firme staranta apud sia edzo Havel, benita per kvar infanoj: Havel, Markéta, Jaroslav kaj Zdislav; ŝi estas sanktulino montranta, ke patrino de la familio plenumas apud aliaj funkcioj ankaŭ gravan kaj neŝanĝeblan funkcion en la eklezia korpo kaj en la organismo de la nacio.

Knabina aperaĵo de sinjorino Zdislava povas ŝanĝi nebuliĝon de nia espero, premita per fiereco de la racio en la vivon de la kredo. Plenumiĝu ankaŭ je ni ŝia juna kaj diskrete kaŝita pripeto.

Je fino de nia hodiaŭa medito pri sinjorino Zdislava ni citu el la paŝtista letero de episkopo de Litoměřice - kardinalo Štěpán Trochta, skribita okaze de la 750-jara datreveno de la naskiĝo kaj bapto de la beata Zdislava el la 28-a de aŭgusto 1970, en kiu ni trovas kelkajn ideojn, kiujn ni jam aŭdis en antaŭaj partoj:

„Kuraĝo, fido kaj amo al la hejma medio, heredita post la patro - moraviano - harmonie miksiĝas en Zdislava kun monda supervido kaj universala klereco, kiun alportis el kultura Sudo ŝia sicilia patrino.

Post alveno de dominikanoj en

niajn landojn, ekkonis Zdislava en la ordeno de Fratuloj Predikantoj renensancan movadon de tiama kristana mondo. Kun sia edzo ŝi konstruigis preĝejon kaj monaĥejon en Jablonné kaj Turnov. Laŭ legendo ŝi alportadis konstrumaterialon al masonistoj per propraj manoj. Se temas pri la afero de Dio, ŝi evitas neniun laboron, klopodon kaj oferon. Ŝi estas modela laika apostolino, sociala kaj karitata laborantino.

Zdislava estas juna edzino, kiun premas hejmaj kaj publikaj zorgoj. Sed ĉar ŝi preĝas kaj estas plena de sankta Spirito, ŝi scipovas harmoniigi sian publikan agadon kun la devo de la edzino, patrino kaj dommastrino tiel, ke unu ne malprofitas la alian, sed ĉio kreas harmonian tutajon de la sankta vivo. Tial ŝi estas modelo por niaj edzinoj, patrinoj kaj edukistinoj.

Ĉi tiu nobelino faris ankaŭ grandan apostoladon de kristana amo. Ĉiuj senhavuloj trovis ĉe ŝi azilon kaj helpon. Ŝi mem strebis pri plibonigo de vivkondiĉoj de la laborantoj en bienoj de ŝia edzo.

Sed Zdislava scipovas ankoraŭ pli multe: per sia intuicio kaj amo ŝi gvidas al prudento kaj saĝeco drastan batalanton, kiu estas ŝia edzo. El ĉi tiu vidpunkto ŝi havas signifon por la tuta eklezio kaj por la tuta hodiaŭa mondo. Ĉi tiun nian mondon, moviĝantan lastatempe preskaŭ rande de la detruo, gvidas nome ekskluzive viroj. Ĉu ne estas senĉesa kulminado de la mondaj situacioj sekvoj de malgranda intereso kaj partopreno de virinoj en la publika agado?

Kvankam Zdislava ne partoprenis batalojn kiel ŝia kavalira edzo, ŝi scipovis ĝuste taksu, kiam tiu vira plaĉo en senĉesa interbatalo transpaŝas limojn de sana

racio. Ŝia virina diplomatio gvidata de Spirito de Kristo, sciis nobligi la drastajn manierojn de la edzo kaj anime lin edifi.

Zdislava, lernigu edzinojn al la forgesita arto de sanktaj virinoj: ili devigu siajn edzojn al respektado de sana mezuro en aferoj hejmaj kaj publikaj, por ke ili sanktigu siajn familiojn!"

Pri la vivo de Zdislava verkis esean libron *Lumo en obskuroj* klasika majstro de la ĉeĥa prozo Jaroslav Durych kaj romanon *En blazono leonino* nuntempa beletristino Alena Vrbová - laŭ la romano estis farita ankaŭ samnoma filmo.

(laŭ Marta Lorková)

Sankta Johano Sarkander (20.12.1576-17.3.1620)

Johano Sarkander naskiĝis en Skoczów en la jaro 1576. Post morto de la patro la patrino transloĝiĝis al Příbor. Tie Johano vizitadis lernejon. Li studis ĉe jezuitoj en Olomouc kaj Praha. Post doktoriĝo pri filozofio li decidis sacerdotiĝi. Tiun celon li atingis en 1609. Kiel sacerdote li aktivadis en Uničov, Charváty, Zdounky, Boskovice kaj Holešov. Li laboris kaj preĝis. Kun la parohanoj li paroladis pri Dio kaj kun Dio li paroladis pri la parohanoj. Ĉio preparis sin por ŝtormo - por komenco de tridekjara milito. En 1618 okazis ribelo de nobelaro. Protestantoj okupas preĝejon kaj paroĥdomojn de katolikoj. La vivo de pastro Johano ne estas sekura. Li pilgrimis al Ĉenstohovo opiniante, ke dum lia forrestado la ŝtormo forrapidos. Sed post la reveno li povas aktivi nur sekrete. Februare Moravion trapasis kozakoj por helpi al la imperiestro. Dumvoje ili ĉion bruligas kaj detruas. Johano iris renkonten al ili kun procesio tenante la monstrancon kun Eŭĥaristio. Kozakoj haltas kaj ne atakas la

urbon Holešov. Sed tiukaze Johano estas kaptita kaj kulpigita pro kunligo kun kozakoj. En Olomouc li estis enkarcerigita kaj terurege torturita. Trifoje li estis brulvundita kaj demandesplorita, kion li scias pri kozakoj, ĉu almenaŭ sinjoro Lobkovic ion diris al li pri ili dum pek-konfeso. Li diris: „Eĉ se mi ion el la pek-konfeso memorus, mi ne malkaŝus tion“. Li mortis en la karcero la 17-an de marto 1620. La protestantoj malpermesis lian solenan entombigon. La sciigo pri lia braveco baldaŭ disvastiĝis ĝis Hispanio. Li estis beatproklamita en 1860.

Sarkander per aliaj okuloj

En la ĉeĥa gazetaro ni legis kontraŭdirojn:

La proksimiĝinta kanonizado de la moravia beatulo Jan Sarkander, okazonta maje en Olomouc, certagrade prokrastigas la ekumenan interkompreniĝon inter la ĉeĥaj katolikoj kaj la ceteraj ĉeĥaj kristanoj. Re prezentantoj de la Eklezio Ĉeĥoslovaka Husana akorde kun la Ĉeĥfrata Eklezio Evangelia opinias la strebojn kanonizi Sarkanderon malfeliĉaj.

La rekatolikigaj metodoj de pastro Sarkander, kiujn li praktikis, estas rekta malo de la ekumena procedo de kristanaj eklezioj, anoncita de la Dua Vatikana Koncilio en la sesdekaj jaroj. „La mesaĝo, kiun portas la memoro pri Johano Sarkander, enhavas nenian toleremon, tiom malpli minimuman alvokon al ekumena kunlaboro,“ deklaris la episkopo de Eklezio Ĉeĥoslovaka Husana en Olomouc Vlastimil Zítek. Laŭ sinoda senioro Pavel Smetana, kiu prezidas la-ekumenan konsilion de eklezioj, Johano Sarkander estis „sendube reprezentanto de perforta rekatoligado, kiun li mem partoprenis.“

Laŭ atesto de historiaj fontoj, la

fervora klopodado de Sarkander revenigi la ŝafojn en la sinon de la vera eklezio, rezultigis konfliktojn kun la kredantoj, plurajn admonojn de kardinalo Dietrichstein (episkopo de Olomouc) kaj sesfojan translokigon de Sarkander dum sep jaroj. Lian martiran morton ne eblas apartigi de lia antaŭa agado. Li fariĝis viktimo de politika batalo, kiam Moravion invadis sovaĝaj rajdistoj en la servoj de la pola reĝo, kaj Sarkander estis torturata por konfesi la kunlaboron de sia mastro Ladislav de Lobkovice kun la malamiko (ili ambaŭ estis opiniataj ŝtatperfiduloj).

La kanonizado de Johano Sarkander verŝajne frostigos la rilatojn inter la ĉeĥaj katolikoj kaj nekatolikoj. Tamen ŝajnas, ke ĝi estas precipe strebo de la episkopejo en Olomouc. Kiel mildigon de tiu tikla afero eblas kompreni la anoncon de la Praga ĉefepiskopo, kardinalo Miloslav Vlk, ke ĉio estas preparita por kanonizado de la beata Zdislava de Lemberk, piulino de la 13-a jarcento. „La sinjorino de la honesta vivo“, kiel nomis ŝin la aŭtoro de la t.n. Dalimil-kroniko, devus kompensi la sanktulon, kiun glorigis la rekatoliga tradicio.

Kanonizado de Sarkander?

La kontraŭdirojn respondas episkopo el Olomouc Jan Graubner:

Por katolikoj la kanonizado de Sarkander neniakaze estas ligita kun intenco elvoki problemajn rilatojn inter kristanoj de diferencaj konfesioj. En diversaj gazetoj kaj deklaroj ni legas, ke la nomo de Johano Sarkander estas ligita kun perforta rekatolikigado de la lando aŭ eĉ, ke J. Sarkander estas reprezentanto de kontraŭprotestantisma misio. La aŭtoroj de tiaj proklamoj forgesas, ke Johano Sarkander estis martirigita (marto 1620) antaŭ la Batalo apud Prago (novembro

1620). Nur post ĝi eblas paroli pri rekatolikigado.

Ankaŭ antaŭ la Batalo okazis bedaŭrinde multe da perfortado, kiam tutaj komunumoj estis devigitaj akcepti foje katolikan, foje protestantisman parohestron, sed tiutempe decidadis la nobelaro laŭ principo propagata de protestantoj: Cuius regio, eius religio (kies regiono, ties religio). La aserto (Telegraf 22.11.1994), ke Johano Sarkander estas laŭ plejparto de historiaj analizoj sendube reprezentanto de perforta rekatolikigado, kiun li mem partoprenis, kaj ke li kontribuis al likvido de frat-ekleziaj komunumoj en Moravio, estas erara aŭ almenaŭ nesufiĉe dokumentita. Laŭ historiaj materialoj oni ne sukcesis pruvi, ke li estus likvidinta iun ajn frat-eklezian komunumon. Ekzemple en Holešov elpelis barono Lobkovic protestantisman parohestron kaj invitis katolikan; Sarkander fariĝis tiu parohestro, sed nur post sep monatoj. Sekve riproĉi al li, ke li elpelis la nekatolikan parohestron, ne estas pure. Se li akiradis alikredantojn kiel homo pacama, de honesta vivo kaj ekzemplo (kiel skribas la urbestro kaj skabenoj de Kroměříž al kardinalo Ditrichštejn petante, ke Sarkander estu nomumita dekanato en Kroměříž), tio povas al iu malplaĉi, sed rajtigas neniun fari al li riproĉojn.

Sarkander vivis en epoko religie kaj politike tre komplika kaj fariĝis viktimo de la tempo kiel multaj aliaj, kiuj suferis pro katolikeco aŭ protestantismo, pro politiko aŭ suspekto pri sorĉado. Sed Sarkander elstaras kiel martiro pro heroecaj virtoj. Mi ne konas kazon, ke iu alia ĉe senkompare malpli forta torturado ne lasus sin rompi. Ĉiuj estis volontaj konfesi sub teruraj doloroj eĉ tion, kion ili

ne faris. Johano eltenis, kiel pruvas fidindaj protokoloj pri enketado kaj torturado. La kreskanta suferego katenas lin al Dio. Li preĝas, neniun malbenas, videblas nenia signo de malamo al tiuj, kiuj lin torturas. Tia grandeco ekzaltas. Precipe en la tempo de totalismo por multaj el ni Johano Sarkander estis modelo kaj ekzemplo kiel kondukti ĉe komunistaj demandesploradoj. Tie kreskis nia inklino al li. Se danke lian ekzemplon kaj espereble ankaŭ danke lian propetadon multaj el ni sukcesis en ekzamenoj de la pasinteco, ne eblas, ke ni forgesu lin nun, kiam ni estas liberaj.

Sarkander certe havas ion por diri ĝuste al nia tempo. Kiel viktimo de religiaj konfliktoj kaj militoj li estas por ni alvoko al dialogo. Kiel viktimo de fideleco al la devo (konservado de la pekkonfesa sekreto) kaj al sia konscienco li iĝas aktuala imperativo por la nuna epoko, kiu preferas pragmatismen kaj utilismen, aprezadon laŭ grado de agrableco. Per eksterordinara fideleco al preĝo (kiam li havas elartikigitajn brakojn, li foliumas en la preĝlibro per lango) li montras al la kredantoj, kie ĉerpi forton por heroeca fideleco al amo eĉ rilate malamikojn. Al katolikoj, kiel martiro de pekkonfesa sekreto, li montras valoron de tiu sanktaĵo.

La kanonizado de Sarkander estas kontraŭ neniuj. Katolikoj komprenas la klopodon pri kanonizado kiel dankesprimon ne nur pro bona ekzemplo, kiu kuraĝigadis en malfacilaj tempoj, sed ankaŭ pro mirakla resanigo, kiu okazis en Skoców en la pasintaj jaroj. La internacia kuracista komisiono rekonis la neebulon de natura klarigo de la eksterordinara resaniĝo, kaj la eklezio post longaj traktadoj la miraklon konfirmis. Katolikoj

akceptas kanonizadon kiel donacon de Dio por la nuna tempo, kiel donaco, kiu devontigas plenumi la hereditan mesaĝon.

Rimarkigo: Cijare la papo kanonizos ankaŭ tri martirojn el Košice dum sia vizito en Slovakio.

LA PAPO DENOVE UZIS ESPERANTON

Dum la Paska Dimanĉo la 16-an de aprilo 1995 en sia vatikana beno „Urbi et Orbi“ (al Urbo kaj Mondo) la papo uzis 57 lingvojn. La sepa kaj oka estis la ĉeĥa kaj slovaka, la antaŭlasta Esperanto kaj la lasta lia gepatra pola lingvo.

GUSTA PRONONCO LAŬ BULONJA KONGRESO

Pri ĝusta elparolado de Esperanto nia gazeto jam publikigis artikolojn de mgr. Zdeněk Hřel (Starto 6/93) a de Jaroslav Mařík (Starto 3/94). En la gazeto Lingvo Internacia (aŭgusto 1905) estas detale priskribita la Bulonja kongreso, dum kiu realiĝis interparolo de kelkaj gřavuloj kun d-ro Zamenhof pri la sama temo. Inter la diskutantoj aperas ankaŭ ĉeĥoj Kühnl kaj Balik.

Denova ĝenerala kunveno fariĝis la saman tagon vespere. En la programo estis enskribita 1-e, kiamaniere oni povas plej bone disvastigi Esperanton ĉe la junularo (S-ro Privat); 2-e, la sursignitaj literoj Esperantaj (S-ro Saint-Martin). Sed en la komenco D-ro Zamenhof diris, ke kelkaj personoj demandis lin pri la riproĉindaĵoj, kiujn li rimarkis ĉe diversaj kongresanoj rilate al sia elparolado de nia lingvo. Tial la aŭtoro de Esperanto deziris publike doni la petitajn klarigojn, kaj li komencis tre interesantan paroladon. Li kritikis unue

la ĝeneralan elparoladon de multaj francoj, kiuj, forerarigataj de sia nacia lingvo, ĉiam metas la tonan akcenton sur la lastan silabon de ĉiu vorto. „Sed,“ diris D-ro Zamenhof, „ne forgesu, ke se ĉiam la antaŭlastan silabon oni devas pli laŭtigi, la lasta silabo tamen devas esti sufiĉe bone elparolata, por ke oni bone aŭdu ĝin, kaj oni ne devas ĝin tute engluti, ĉar ĝi sola montras la rolon de la vorto en la frazo kaj tial havas tre grandan signifon“. Konklude, oni devas ĉiam zorgi akcenti la antaŭlastan silabon, sed ankaŭ bone aŭdigi la lastan.

Simile, la vortoj entenantaj *aŭ*, *eŭ* ne devas esti elparolataj kvazaŭ ili estus skribitaj *a-u*, *e-u*; sed tiu mallonga *ŭ* estas kvazaŭ konsonanto kaj formas nur unu silabon kun la antaŭiranta vokalo.

Poste, D-ro Zamenhof petas S-inon Junck, ke ŝi elparolu ian tekston por montri la ĝustan elparoladon. S-ino Junck elparolas tiam „La Vojo“.

D-ro Zamenhof aldonas post tiu deklamado: „*l* devas esti elparolata plej klare, nek tro mole, nek tro malmole, sed en meza maniero.“

S-ro Grabowski poste starigas kaj kritikis regulon troveblan en kelkaj francaj lernolibroj. Li diras: „la voĉa akcento devas nek tro longigi, nek tro mallongigi la vokalon. Ekzemple en francaj lernolibroj oni trovas, ke oni devas ĉiam elparoli *e*, *o*, *a* kiel la francajn *é*, *ô*, *â*. Tia elparolado ne estas ĝusta, kaj aliparte tute ne ebligas, ke oni metu la akcenton sur la ĝustan silabon, ĉar vole-nevole oni devas tiam akcenti la lastan silabon.“

S-ro Cart: La riproĉindaĵo estas jam forprenita el la lastaj eldonoj de *Esperanto en dix leçons*. Sed oni ne povas ĉiam elparoli (almenaŭ francoj) nur malfermitajn vokalojn. Mi opinias, ke la akcentata vo-

kalo estas ĉiam aŭ preskaŭ ĉiam longa; la neakcentata silabo estas neniam longa.

S-ro Høvelev (anglo): Mi demandas, ĉu *e* devas ĉiam esti mallonga (franca *e*) kaj neniam longa (franca *e*)?

D-ro Zamenhof: En Esperanto, ĉiuj literoj devas esti mezaj; sekve *e* ankaŭ devas esti nek tro fermita nek tro malfermita.

S-ro Kühnl (bohemo): Kelkaj samideanoj elparolas *haj*, *hensas*, anstataŭ *kaj*, *pensas*; aliaj tute ne sonigas *h*; ĉu tio estas ĝusta?

D-ro Zamenhof: Komprenoble, ĉiu sono devas esti elparolata; sed oni ne devas ĝin troigi, kiel ekzemple *khavas* anstataŭ *havas*.

Estas farataj ankaŭ diversaj rimarkoj pri *d*, *n*, elparolataj kvazaŭ *dj*, *nj*, de kelkaj samideanoj. Ankaŭ *nj* ne estas la granca *gn*.

S-ro Bourlet: Nur tre malgrandaj diferencoj ekzistas en nia elparolado; ili tute ne malhelpas la komprenon; estus bedaŭrinde, se malaperus tiu rimedo rekonii la naciecon de la Esperantistoj.

Aliparte, en vortoj kunmetitaj, laŭ mia opinio, estas pli facila uzi tiom da akcentoj, kiom estas da kunmetradikoj; tio ĉi ankaŭ povas malhelpi malkomprenigojn, ekzemple: *pie-diranto*, kaj *pied-iranto*; *diamanto* kaj *Di-amanto*.

D-ro Zamenhof: Tre ĝuste.

D-ro Bein (polo): S-ro Kühnl forgesis diri, ke oni ne devas meti la akcenton sur la unuan silabon (*ridoj*).

D-ro Zamenhof: Ofte oni forgesas akcenti *i* antaŭ alia vokalo kaj elparolas kvazaŭ *alja*, *opinjo*, ktp. Tio ĉi ne estas ĝusta.

D-ro Ostrowski: Mi rimarkis, ke kelkaj samideanoj ne elparolas *f*, sed *j*.

S-ro Pourcines (franco): Mi demandas, ĉu oni devas elparoli *r* gorĝe aŭ lange?

D-ro Zamenhof: Multaj personoj ne povas

elparoli unu aŭ alian el tiuj du *r*. Sed tio ne malhelpas: ili faru laŭ sia eblo.

S-ro Pourcines: Sekve, tiuj diferencoj absolute ne estas gravaj.

D-ro Lambert (anglo): Kiel oni devas diri: *homoj* aŭ *homoi*?

D-ro Zamenhof: *Oj* devas esti unu sola silabo.

D-ro Bein: Ni poloj facile metas la akcenton sur la antaŭlastan silabon, ĉar ĝi ankaŭ en nia nacia lingvo tiel estas. Sed se ni diras *onji*, *djiras*, tio ĉi devenas de tio, ke en pola lingvo *i* moligas la antaŭan konsonanton.

S-ro Balik (bohemo): Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj!

S-ro Boirac: La nuna okazo montras, ke ĉiu nacio havas siajn proprajn malfacilajetojn en la elparolado de nia lingvo, sed ili estas tute ne gravaj kaj neniel malhelpas la reciprokan komprenigadon.

Príspevkový řád

Kategorie KČ popis kategorie členství

A alespoň 120,- výdělečně činní

B alespoň 60,- důchodci, studenti, volající základní služby, ženy v domácnosti, invalidé, nezaměstnaní

C alespoň 300,- podporující esperanto (mecenáši, sponzoři)

D alespoň 30,- rodinní příslušníci (další členové domácnosti, kde už jeden odebírá Starto za plné členství)

E alespoň 30,- příznivci esperanta (děti a ti, kteří neumějí esperanto, ale hlásí se k myšlence dorozumění; nedostávají Starto)

F alespoň 2400,- doživotní členství

G alespoň 90,- příznivci esperanta dostávající Starto

Zápisné 20,- (při vstupu do svazu)

Zahraniční členové 20,- ECU

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1**

☆ STARTO ☆

**Periodikum Českého esperantského svazu
Vychází 6x ročně a je určeno členům svazu.**

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrátor: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Evidence a změny adres: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare.

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio.

Abonprezo: 15 gld.

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrato: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Ĉeĥa Respubliko

Podávání listovních zásilek povoleno

JmŘS Brno, č. j. P/3-8847/91 ze dne 28. 8. 1991

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti u pošty
664 03 Podolí u Brna**